



# Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2023 (227)

12. 1. 2023

## La praga klubo festis sian 120-an datrevenon



Foto: Jiří Mišurec

Ekde la 11-a ĝis la 13-a novembro 2022 organizis la Esperantista klubo en Prago grandan feston memore al la 120-a datreveno de sia fondo. Internacian renkontiĝon kun prelegoj, promenoj, filmoj, kantado kaj bonaj manĝaĵoj partoprenis kvar dekoj da samideanoj de kvin landoj. Pri la sukcesa evento amplekse raportis la revuo *Staro* kaj ankaŭ Varsovia Vento en sia elsendo.

### EL LA ENHAVO

La 120-a datreveno .....	1
Rememoroj de František Barth .....	8
Rememoroj de Stanislav Kamarýt .....	12
Lokoj ligitaj kun la frua historio de la klubo	14
Homoj (E. Urbanová) .....	19
Juna amo (A. Sova) .....	20
Aktualaĵoj .....	21

### O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980  
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze  
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7  
Vychází třikrát ročně  
Kontakt: [t.brichacek@seznam.cz](mailto:t.brichacek@seznam.cz)  
Redaktor: Tomáš Břicháček  
Korektury: Pavol Petřík



### **Bonveniga vespero en la centro Elpida**

Vendrede la 11-an de novembro vespere proksimume duono de la partoprenantoj kolektiĝis en la centro Elpida en la kvartalo Holešovice (str. Jankovcova n-ro. 8b). Atendis ilin multnombraj bongustaĵoj preparitaj fare de volontuloj de la klubo E-mental'. Sekvis prelego de Petr Chrdle pri novaj libroj de KAVA-PECH kaj rakontado de Vlasta Piščíková (kun la helpo de Radmila Švejcárová) pri ĵusa vojaĝo de kelkaj E-mentalanoj en Italio. Fine Pavla Dvořáková kaj Josef Kalčík prenis en manojn siajn ukulelojn kaj ĉiuj komune kantis belajn Esperantajn kantojn.

### **Eduka promeno tra la urbocentro**

Sabate la 12-an de novembro antaŭtagmeze preskaŭ ĉiuj partoprenantoj entreprenis sub la gvido de la prezidanto Tomáš Břicháček promenon tra la urbocentro (nome kvartaloj Nové Město kaj Staré Město) preter lokoj ligitaj kun la historio de nia klubo. Oni komencis en la klubejo Ve Smečkách kaj la sekvaj stacioj inkludis interalie iaman gastejon „U Štajgrů“ (nun domo „U Nováků“) en la strato Vodičkova, iaman gastejon „U Pštrossů“ en la strato Pštrossova, Žofín, kafejon „Louvre“ kaj iaman kafejon „Union“ en la avenuo Národní, Muzeo de Náprstek, domon en la strato Dlouhá, kie loĝis Jaroslav Šustr kaj lian iaman vendejon en la strato Benediktská. Pli da detaloj pri la vizititaj lokoj troveblas en aparta artikolo en tiu ĉi Bulteno.



## Programo en la kafejo AdAstra



La ĉefa parto de la programo efektiviĝis sabate posttagmeze kaj vespere en la hejmeca kafejo „AdAstra“ proksime de Vyšehrad (str. Podskalská n-ro. 8).

Unue oni tagmanĝis. Poste Tomáš Břicháček alparolis la ĉeestantaron kun solena parolado, post kio tuj sekvis lia prelego pri la fondiĝo de la praga klubo. La dua preleganto estis Irek Bobrzak el Pollando, kiu informis pri la retaj elsendoj kaj jutubaj videoj de Varsovia Vento.

Anstataŭ atendata torto venis surprizo. Oni aranĝis sur tablo grandan nombron de kuketoj kun kremo kaj verdaj steletoj, kiuj kune formis la numeron 120.



Alfred Heiligenbrunner el Aŭstrio poste prelegis pri imunsistemo kaj vakcinado. Tomáš Břicháček projekciis kelkajn malnovajn mutajn filmetojn el la historio de la klubo. La lasta prelego, kiun preparis Petr Chrdle, temis pri la poetino kaj verkistino Eli Urbanová.



Post vespermanĝo la esperantista himno „La Espero“ malfermis la mallongan blokon nomitan „oficialaĵoj“. Dum ĝi estis unue legata la salutletero de la prezidento Miloš Zeman. Poste estis premiitaj kvin pliaĝaj merituloj de la klubo per dankesprimoj pro longtempa laboro por Esperanto. Estis gesamideanoj Margit Turková, Libuše Dvořáková, Viktor Dvořák, Jindřich Košťálek kaj Petr Chrdle. Premiita estis ankaŭ la prezidanto Tomáš Břicháček pro vigla laboro por la klubo.

Plua programero estis projekciado de la Cimrmana teatraĵo *Murdo en salona kupeo* kun esperantlingvaj subtekstoj. La tradukon preparis Vlasta Piščíková, Jan Šebetovský kaj Petr Javorik.

Dume alvenis grava gasto, nome operkantistino Vanda Šípová, kiu aktoras en la opero *Sternenhoch*. Ŝi laudis Esperanton kiel bone kanteblan lingvon. Ŝi ankaŭ kantis fragmenton de la opero.

### **Dimanĉa adiaŭa promeno**

Dimanĉe la 13-an de novembro matene oni renkontiĝis antaŭ la Kongresa Centro en Vyšehrad apud la Esperanto-ŝtono. En frosta vetero oni trinkis ion varman, kantis denove „La Esperon“ kaj fotis sin. Poste sekvis promeno tra Vyšehrad. Fina punkto en la programo estis tagmanĝo en la restoracio V Podskalí (str. Podskalská n-ro 29), kie oni danke al E-mental' jam longe havas menuon ankaŭ en Esperanto.



## El la solena parolo de Tomáš Břicháček

„... La datreveno, kiun ni festas, estas sendiskute impona kaj igas nin halti kaj retrospekti. La 9-an de novembro pasis jam 120 jaroj ekde la momento, kiam malgranda grupeto de pioniroj aŭdacis – unu jaron post la sukceso de la samideanoj en Brno – fondi Esperantan klubon en nia metropolo, la duan en nia lando.

La komencoj estis malfacilaj kaj modestaj, sed la movado rapide akiris decidemon kaj forton, kaj ne haltigis ĝin eĉ la multnombraj malfacilaĵoj, kiuj iom post iom estiĝis. La klubo travivis du mondmilitojn, la nazian okupacion kaj komunisman premon. En la tempo de grandaj ŝanĝoj post la novembro 1989 ĝi konservis la ritmon kaj finfine sukcese eniris la novan ciferecan epokon.

Inter pragaj esperantistoj ĉiam estis multaj kreemaj kaj intelektaj personoj (kiel Eli Urbanová, Jiří Karen, Čestmír Vidman kaj aliaj). Merite de ili riĉa kulturvivo formiĝis ĉirkaŭ la klubo tra la jaroj. Ekstaris ankaŭ multaj lertaj gvidantoj kaj organizantoj (kiel Jaroslav Šustr), sen kiuj la movado ne povus funkcii. Fine, ĉiam estis inter ni multaj bonaj, diligentaj, sindonemaj ordinaraj homoj, kies nomoj povas esti preskaŭ forgesitaj, sed kiuj vivis kaj spiris por la nobla ideo de la internacia lingvo kaj kiuj estis kaj estas la vera substanco de nia komunumo. Danke al ĉiuj tiuj tri specoj de homoj – kulturemuloj, organizantoj kaj entuziasmuloj – la Esperantista klubo en Prago ekzistas kaj estas forta ero de la ĉeĥa Esperanto-movado ĝis nuna tempo.

Ni rigardu la estontecon kun optimismo kaj kredo, ke en la venontaj jaroj la klubo havos eĉ pli da tiaj aktivaj kaj viglaj membroj kaj favorantoj. Ni deziru, ke Esperanto en Prago, en Ĉeĥio kaj en la tuta mondo vivu kaj prosperu plu kaj pli! ...“



## La salutletero de la prezidento Miloš Zeman


Vážení a milí přátelé esperanta,  
srdečně Vás pozdravuji při příležitosti 120. výročí založení vašeho klubu. Mezinárodní jazyk esperanto mne vede ke krátkému zamyšlení. Svět, jak můžeme v současnosti sledovat, se rozděluje a vznikají nové příkopy a nová nepřátelství. Esperanto, jeho poselství, jde jiným směrem. Představuje společného jmenovatele lidstva, prvek, který jde proti rozdělení a sváru. Ano, je to vznešená myšlenka, která by měla inspirovat. Přeji vám vše dobré, ať dál šíříte pozitivní záměr mezinárodního jazyka esperanto.

### Traduko:

Estimataj kaj karaj amikoj de Esperanto,  
mi kore salutas vin okaze de la 120-a datreveno de fondo de via klubo. La internacia lingvo Esperanto gvidas min al mallonga pripenso. La mondo, kiel ni povas nuntempe observi, dividiĝas kaj estiĝas novaj fosaĵoj kaj novaj malamikecoj. Esperanto, ĝia misio, iras alian direkton. Ĝi prezentas komunan denominatoron de la homaro, elementon, kiu iras kontraŭ divido kaj malpaco. Jes, ĝi estas nobla ideo, kiu devus inspiri. Mi deziras al vi ĉion bonan, por ke vi plu disvastigu la pozitivan celadon de la internacia lingvo Esperanto.

*Tradukis Miroslav Malovec*

## Jubileaj broŝuro kaj kroniko



Okaze de sia jubileo la praga klubo eldonis du publikigaĵojn:

La broŝuro *120 let esperanta v Praze* estas ĉeĥlingva materialo por la vasta publiko, kiu informas pri Esperanto kaj pri la klubo. Ĝia elektronika versio elŝuteblas ĉi tie: <http://bulteno.cs-retromusic.net/B032022.pdf>.

Aperis ankaŭ nova versio de nia elektronika kroniko, kiu nove enhavas ankaŭ la kronikon de Jiří Patera. Ĝi elŝuteblas ĉi tie: <http://bulteno.cs-retromusic.net/kroniko.pdf>.

# Eĥoj de la festo

## 120 jaroj de Esperantista klubo en Prago 11 - 13 novembro 2022

Vendrede la 11-an de novembro 2022 vespere la festado de la klubo komenciĝis en la Centro Elpida en kvartalo Holešovice.



Venis ĉirkaŭ dudek personoj, kiujn atendis tablo plena de manĝoj, prelegoj *Novajoj de KAVA-PECH* kaj *E-mental en Italio* kaj komuna kantado kun Pavla Dvořáková, kiun akompanis Josef Kalčík (ambaŭ ludis ukulelojn).



Sabate la 12-an de novembro 2022 ĉiuj kolektiĝis en la klubejo de la Esperantista Klubo en Prago (EKP) en la strato *Ve Smečkách*. Alvenis pli multaj personoj, ankaŭ gastoj eksterlandaj, nome Irek Bobrzak el Pollando, Alfred Heiligenbrunner el Aŭstrio kaj slovaka lingvisto Stano Košecký.



Post mallonga salutparolo de la kluba prezidanto Tomáš Břicháček komenciĝis promeno tra Prago, kies celo estis viziti la lokojn iel gravajn por la Esperantomovado en Prago kaj Ĉeĥio.

Jam en la sama strato troviĝas Macanbiblioteko por nevidantoj kaj en la kontraŭa domo de Teatra Klubo estis iam Virina Esperanto-Rondeto.

Nia unua halto estis ĉe iama gastejo U Štajgrů, kie la praga klubo estis fondita (nun tie staras domo U Nováků). Poste ni vidis lokon, kie Lorenc havis unuan (ne


Miroslav Malovec kiel partopreninto de la festo skribis pri ĝi longan raportaĵon kun fotoj (*120 jaroj de Esperantista klubo en Prago*). La teksto aperis en Starto n-ro 4/2022.

## La 161a elsendo


2022/12/22 de viavento | 4 komentoj




Petr Chrdle dum prezentado de noveldonitaj libroj




La 1a parto (tempo-daŭro 32:28) elŝutu



La 2a parto (tempo-daŭro 29:46) elŝutu



La 3a parto (tempo-daŭro 30:49) elŝutu



La 4a parto (tempo-daŭro 33:01) elŝutu

Varsovia Vento dediĉis al tiu evento grandan parton de sia 161-a elsendo. Speciala danko apartenas al Irek Bobrzak. La elsendo troveblas en la sekvanta ligilo: <https://www.podkasto.net/2022/12/22/la-161a-elsendo/>

## Honore al Eli Urbanová

En la jubileaj tagoj aperis la libro *Honore al Eli Urbanová – 100 jaroj post la naskiĝo, 10 jaroj post la forpaso*, kiun redaktis Petr Chrdle.

### Enhavo:

Enkonduko (Chrdle)

Peza vino (Urbanová)

Ĉion kulpas viroj (Urbanová)

Letero al komencantaj poetinoj (Urbanová)


Konfeso (Urbanová)

La vivo kaj verko de Eli Urbanová (Malovec)

Eli Urbanová en datoj (Malovec)

Kelkaj rememoroj al Eli (Chrdle)

Probable la lasta letero de Eli (Chrdle)



## Fondo de „Esperantista klubo en Praha“

František Barth

La jaroj pasas. Pasos jam dudek kvin jaroj de la tempo, kiam ni fondis „Esperantistan klubon en Praha“. La samtempuloj malrapide foriras. Certe estus dezirinde ĝustatempe kolekti ĉiujn informojn pri la komencoj de la movado ĉe ni. Nun ankoraŭ oni povas kolekti multajn rememorojn de la partoprenintoj kaj multajn skribajn dokumentojn – ambaŭ fontoj, personoj kaj dokumentoj, estos senĉese pli kaj pli maloftaj.

Mi volas provi priskribi la historion pri la fondo de la klubo en Praha.

En la fino de la jaro 1901 aperis en „Sběratel dopisnic“ (Kolektanto de poŝtkartoj), redaktita de S-ro Jirků, tiame funkciulo (komitatano aŭ oficisto) de Komerca muzeo en Praha, se mi ne eraras, malgranda notizo malpli ol kvarlinia pri la internacia lingvo Esperanto. Por doni pli detalajn informojn proponis sin S-ro Theodor Čejka, instruisto en Bystřice pod Hostýnem (Moravio). Mi do demandis kaj efektive ricevis pakajon da diversaj materialoj prezentantaj imagon pri Esperanto kaj kune la statuton de „První rakouský klub esperantisti v Brně“ (La unua klubo de aŭstriaĵ esperantistoj en Brno, Moravio; prezidanto † redaktoro K. Pelant, sekretario J. Kajš).

Lerninte Esperanton mi nature komencis serĉi aliajn partianojn en Praha. Mi petis la klubon en Brno sciigi al mi la adresojn de esperantistoj el Praha; oni rekomendis al mi serĉi ilin en la adresaro de Zamenhof, eliranta tiame kiel malgranda kajereto unufoje dum la jaro. En la jarkolekto 1902 mi trovis krom mia adreso ankoraŭ dek aliajn de Praha. Mi trovis, ok el tiuj enskribitoj dume jam perdis la intereson pri la afero aŭ ŝanĝis loĝejon, ke ili transloĝiĝis, „oni ne scias, kien“.

Mi rimarkis, ke oni devas fari propagandon de unu persono al la alia. Sed tio estis afero tre malfacila. Kiu travivis la komencojn de Esperanto ĉe ni, certe memoras la parolaĉojn ĉe sola aludo pri Esperanto. Estis al mi klare, ke la unuopulo sen libera tempo kaj sen financaj rimedoj malmulte atingos kaj inter miaj konatoj ne estis personoj tiel feliĉaj por esti riĉaj je aluditaj kvalitoj. Tial ni decidis kolekti la fortojn, fondi societon.

Belega, senzorga entreprenemo de la junaĝo! Al ni ŝajnis nenio pli facila ol fondi la societon, al kiu aliĝos centoj da membroj, kiu fariĝos finance potenca kaj entreprenos energian propagandon por la afero, kiu fariĝis al ni kara.

Iam en duono de februaro 1902 aperis en tiama ĵurnalo „Pražský denník“ [...] – malkara, ne tro legata registara ĉiutaga gazeto – propaganda artikolo pri Esperanto subskribita „Fix“. Jen, subite aperis neatendita kunlaboranto kaj eĉ ĵurnalisto. Ĉe la vizito mi trovis, ke sub la pseŭdonimo „Fix“ estas kaŝita la redaktoro mem de la ĵurnalo S-ro Xaver Menhard, kiu tuj



kompleze promesis aperigadi pluajn artikolojn, se mi transprenos la devon respondi eventualajn petojn pri informoj.

Miaj esperoj kreskis. Sed anstataŭ atendata amaso da interesantoj aperis sole kelkaj (se mi ne eraras, tri) demandintoj. Tamen tio estis sukceso, pro kiu ni estis neordinare fieraj kaj kun plezurego ni daŭrigis nian laboron.

Ni volis fondi en Praha filion, grupon de la klubo en Brno kaj tiu ĉi komence estis inklina fari tion, sed baldaŭ ni konsilis fondi memstaran klubon.

Fondi klubon signifis posedi almenaŭ tiom da membroj por sufiĉi krei komitaton. Afero malfacila, kie preni membrojn? Sed tiame estis ora epoko de Esperanto; ĉiu samideano estis ankaŭ klubano. Do fari samideanojn!

La laboro ne estis tiel facila, kiel ŝajnas al ni hodiaŭ. La cirkonstancoj antaŭ dudek kvin jaroj estis iom aliaj kaj eĉ la vorto „internacia“ estis tiam nebone sonanta. Krom tio la propagando estis farata sole de „ni junuloj“ sen spertoj, sen mono, sen tempo, ĉar ni preskaŭ ĉiuj staris en la komenco de nia kariero.

Mi ne scias, kiel longe ni starus en la komencoj, se ne estus S-ro red. Fix-Menhard, kiu persiste aperigadis notizojn pri Esperanto en „Pražský denník“. Danke tiun ĉi cirkonstancon, tamen kolektiĝis kelkaj scivolemuloj,

el kiuj la plejmulto direkte demandis pri la venonta klubo.

La propaganda agado de Menhard altiris neatendite alian ageman laboranton, teatran raportiston S-ron Kriegelstein-Vojnar, spertulon en societo, bonegan paroliston kaj fervoran societgvidanton – li plej energie instigis la fondon de la klubo. Li fervore propagandis Esperanton en tre vastaj rondoj de siaj personaj konatoj kaj en ankoraŭ pli vastaj rondoj de legantoj de sia semajna gazeto „Nájemník“ (La luanto), multe serĉata pro sia teatra rubriko. En la gazeto li kompleze malfermis rubrikon por Esperanto; li eĉ dediĉis duonon aŭ unu kolonon semajne por la gramatiko kaj ekzercaro; per tiu ĉi rubriko oni gajnis novajn partianojn kaj – ĉefe – oni konatiĝis kun malnovaj samideanoj.

Hodiaŭ eble multaj ridas kaj miras, ke ĝuste „Pražský denník“ kaj „Nájemník“ estis niaj organoj kaj perantoj. Kial ne la grandaj kaj ŝatataj ĵurnaloj? Tute simple pro tio, ke la plejmulto el granda vico da ĉeĥaj ĵurnaloj

ĵetadis la notizojn pri Esperanto en korbojn kaj la petojn pri publikigo de artikoloj eĉ ne respondadis. Kaj kiu respondis, tiu sciis trafi. Ekzemple la redakcio de „Právo lidu“ (Rajto de la popolo; ĉef ĵurnalo de la ĉeĥa sociala demokratio) mian peton publikigi deklinian (!) notizon respondis (3. IV. 1902) tiel:

Nemáme času ani chuti fedrovat	Ni havas nek tempon nek volemon
Esperanto. Jestli tak činí p. Pelant v	propagandi Esperanton. Se tion faras s-o
Brně, je to jeho věcí a nemá pro nás	Pelant en Brno, tio estas lia afero, por ni

žádného významu.

Pokud se týká nějakého insertu, je věcí naší administrace, na níž se račte obrátiti.

Ant. Němec, redaktor.

sensignifa.

Koncerne iun anoncon volu turni vin al nia administracio, ĝi estas ĝia afero.

Ant. Němec, redaktoro.

Tiame estis aranĝata en Praha „La unua laborista ekspozicio“, la unua ĉe ni kaj eble la unua sur la mondo. Ŝajnus nenio pli facila ol propagando de la lingvo internacia sub la devizo „La proletarioj de la tuta mondo unuiĝu!“ Se ni nenie trovis la komprenon, certe ni trovos ĝin tie ĉi. Sekve ni skribis al la ekspozicia komitato petinte permeson elmeti afiŝojn, meti atentigon en katalogon kaj fari diversajn paŝojn, kiuj hodiaŭ ŝajnas al ni tute naturaj. Sed kiel ni eraris. Venis al mi respondo:

Vážený pane! K vašemu dopisu ze dne 17. V. sdělujeme s vámi, že bylo ve výboru I. dělnické výstavy v Praze ustanoveno, aby z Vámi zamýšlených plakátů vyžádán byl poplatek jedné koruny za kus.

Doufáme, že při této nízké ceně na poplatek přistoupíte.

Ant. Reis, místopředs.,

K. Beránek, jednatel.

Estimata sinjoro! Al via letero el 17. V. ni sciigas al vi, ke la komitato de la „I. Laborista ekspozicio en Praha“ decidis postuli la pagon de unu krono por ĉiu de vi intencata afiŝo.

Ni esperas, ke la pagon de tiel malalta prezo vi akceptos.

Ant. Reis, vicprezidanto

K. Beranek, sekretario.

La originalojn de tiuj ĉi kaj de aliaj leteroj mi havas konservitaj por ebla venonta arkivo pri internacia lingvo ĉe ni [...].

En la jaro 1902 la pago unu krono sole por loko estis tre granda, speciale por homo kun monata salajro dudek kvin guldenoj kaj paganta sola ĉiujn poŝtajn elspezojn senĉese kreskantajn.

Sed ĉio ĉi ne prenis al ni la volon por pluaj entreprenoj, kiuj ĉiam finiĝis kun malsukcesoj, pro kiuj ni miris ja, sed kiujn ni tamen preterpasis irante pluen. Nia tuta penado celis interesigi por la ideo iun eminentulon; ni faris provon jen tie jen aliloke – ĉiam sensukcese. Hodiaŭ ni alimaniere rigardas tiamajn malsukcesojn kaj eĉ komprenas, ke ne povis esti alimaniere.

Nur hodiaŭ ni ankaŭ vidas, kiel grandega estis laboro kaj kiel valorega estis helpo de sinjoro Theodor Čejka el Bystřice pod Hostýnem, riĉe kaj malavare subtenanta nin per la plej diversaj presaĵoj, kiujn eldonadi ni mem kun niaj rimedoj ne povis kuraĝi eĉ pensi.

Nia sola sukceso estis artikoloj en „Pražský denník“ kaj la rubriko en „Nájemník“. Eble iu demandas, ĉu havis sencon propagandi Esperanton inter legantoj de „Pražský denník“, al kiuj nenio estis pli malproksima ol la ideo pri la internacia lingvo. Vere la nombro da demandintoj ne estis granda, tamen ni ĝojis eĉ pro la malmulto. Pli oni povis atendi de la legantoj de „Nájemník“ multe disvastigita en tiu tempo pro siaj teatraj kritikoj. Estas juste konstati, ke ambaŭ gazetoj faris, kion ili povis. La estonto tion taksos, ĉar tiame grandaj kaj provincaj ĵurnaloj estis aŭ

malamikaj aŭ indiferentaj. Per tiuj gazetoj malrapide kuniĝadis adresoj de interesantoj, kaj ni povis inviti ilin por kunveni.

Ni kunvokis la unuan kunvenon de la amikoj de lingvo Esperanto al la 20 de junio 1902 en la restoracion en „Konvikt“ (Bartolomějská). La programo de la kunveno estis lego kaj prezento de la statuto de la proponata klubo. La redakto de la statuto ne postulis tro da laboro, ĝi estis farita laŭ kutimaj modeloj.

Ni invitis ĉirkaŭe kvindek personojn, sed en „Konvikt“ venis proksimume dek personoj (unu sinjorino), nombro neatendata de ni post ambaŭ spertoj. La statuto estis prezentita por oficiala aprobo kaj oni povis komenci societan agadon. Sed rigardante la someran sezonon ni decidis kunvoki la ĝeneralan fondan (konstitucian) kunvenon nur en la aŭtuno esperante, ke ni ankoraŭ sukcesos gajni novajn partianojn. La intereson ni vidis laŭ tio, ke la librejo de E. Weinfurter (Vodičkova, Praha II.) vendis en Praha proksimume 300 ekzemplerojn de la lernolibro de Čejka. Estas sendube, se la ĵurnaloj estus akceptintaj niajn notizojn, la intereso povis esti pli granda. La preparojn por fonda kunveno ni kompreneble faris laŭ modesto de niaj financaj rimedoj. Ni dissendis grandan amason da invitoj al individuoj kaj korporacioj, ĉe kiuj ni supozis almenaŭ iometan eblon de la intereso pri la afero, ni bombardis la redakciojn, kaj ni esperis, ke la kunveno estos imponanta. Iu el ni, mi ne memoras kiu, faris belajn afiŝojn por montraĵ fenestroj de komercejoj, kaj ni faris rondan vojaĝon tra komercejoj de ĉefaj stratoj. La rezultato estis, ke ĉie oni rifuzis la afiŝojn, kvankam ili estis vere belaj, kaj ni petis pendigi ilin por solaj tri tagoj.

Sole librejoj de Topič kaj Weinfurter kaj unu alia komercejo sur la tiama strato Ferdinandova (nuna Národní) permesis al ni meti nian afiŝon en ilian montran fenestron.

Plua zorgo estis trovi konvenan ĉambro. La ĉambro en Konvikt, kie ni aranĝis la preparan kunvenon, ŝajnis al ni malgranda, tiu sur la insulo Žofín (Slovanský ostrov) tro multekosta – kaj la nombro da aliaj disponeblaj estis tiame tre malgranda. Fine ni konsentis lui ĉambregon de restoracio „U Štajgrů“ (kie hodiaŭ estas komerca domo de Novak en Vodičkova, Praha II), kiu sufiĉis por 300–500 personoj.

Fine la 9. de novembro 1902 venis tago de la memorinda fonda kunveno de „Esperantista klubo en Praha“. En la granda ĉambrego regis malpleno kaj mallumo, la publiko estis kunvenanta tiel, ke ĉe la komenco prokrastita je unu horo ni kalkulis dek kvin ĉeestantojn, el kiuj du aŭ tri estis nekonataj al ni; la ceteraj 12–13 estis ni, „malnova anaro“.

Tiu ĉi malĝoja komenco nature ne povis entuziasmigi nin kaj tial ni sencere monie elektis la unuajn prezidanton kaj komitaton. La unua prezidanto fariĝis S-ro E. Weinfurter, librovendisto (Vodičkova, Praha II.). La elektita komitato tuj kunvenis kaj konstituiĝis jene: viceprezidanto S-ro

Fr. Kühnl, sekretario S-ro Fr. Barth, kasisto S-ro J. Görner, protokolisto S-ro Ed. Kühnl, inventariisto S-ro S. K. Neumann, bibliotekisto S-ro F. Vaníček, anstataŭanto F-ino Heintalová. Kiel kunvenejo estis elektita la kafejo „Union“ (en la strato tiame Ferdinandova, nun Národní).

Tiel estis fondita „Esperantista klubo en Praha“. La priskribo de ĝia plua historio ne apartenas en la kadron de tiuj ĉi rememoroj. Ĝi aperos aparte.

*Aperis en la revuo „La Progreso“, n-ro 4–5, 1927<sup>1</sup>*

---

## **Niaj komencoj**

Stanislav Kamarýt

La kunveno okazis la 9-an de novembro 1902 je la 20-a horo en ĉambrego de la restoracio *U Štajgrů* en Prago. Ĝi estis la granda restoracio en la strato Vodičkova, en la domo, sur kies loko poste estis konstruita la komerca domo *U Nováků*. Niaj esperoj ne plenumiĝis. En la salono kunvenis 15 homoj. Laŭ la tiama kutimo la uzo de ĉambro estis senpaga, oni atendis konsumon de vespermanĝoj kaj biero fare de la kunvenintoj. Kiam al la ĉefkelnero ŝajnis, ke la gastonombro ne estas sufiĉa aŭ ke la mendoj ne respondas al atendita enspezo, li komencis estingadi la nebezonaĵajn lampojn unu post la alia. La fondado de la klubo do okazis dum griza mallumo en la salono. La listo de ĉeestantoj ne estas konservita. Pro nemulta ĉeestantaro la kunveno procedis senceremonie. Oni elektis la unuan komitaton: Eduard Weinfurter – prezidanto, František Kühnl – vicprezidanto, František Barth – sekretario, J. Görner – kasisto, Eduard Kühnl – protokolisto, Stanislav Kostka Neumann – inventaristo, F. Vaníček – bibliotekisto, f-ino X. Hainthalová – anstataŭantino. Mi kaj Bouška ankaŭ ĉeestis; oni nin tiam ankoraŭ ne elektadis.

La elektita prezidanto E. WEINFURTER estis librovendisto kaj eldonisto en la strato Vodičkova en Prago. En lia tre floranta vendejo estis vendataj la Ĉejka-lernolibroj. Dum tiuj aŭtunaj monatoj estis venditaj ĉirkaŭ 300 ekzempleroj - nombro imponanta al la juna entreprenisto. En lia butikoj okazis la preparaj renkontiĝoj organizontaj la fandan kunvenon.

Kiel sidejon de la Klubo ni fiksis la kafejon *Union*, anguldomon de la stratoj *Na Perštýně* kaj *Národní* (tiam la nomo de la lasta estis Ferdinand-strato). Temis pri fama kafejo de literatoroj, artpentristoj kaj aliaj anoj de liberaj profesioj. Ĝia ĉefkelnero Patera eniris la historion. Oni povis resti ŝuldanta al li la trinkitajn kafojn eĉ dum semajno. La kafejo estis plej riĉe ekipita per gazetoj kaj revuoj diverslingvaj; Sinjoro Patera alportadis ilin en dikaj pakoj al legemaj gastoj tre kompleze. Li multe meritis pri informiteco kaj klereco de siaj klientoj, ĉar li ankaŭ kontrolis, ĉu oni legas

---

<sup>1</sup> kun subtitolo Al la historio de la internacia lingvo en Ĉeĥoslovakio

la prezentitajn materialojn – iam li eĉ ekzamenis. Ankaŭ sekretaj fotoj estis prunteblaj al gasto fidinda. Do, en tiu ĉi kafejo ni kunvenadis ĉiusemajne, – se mi ne eraras, marde. La kafejestro abonis por ni du-tri Esperantogazetojn. Ankaŭ S. K. Neumann venadis preskaŭ regule. Li mendadis absinton. Tio estis tiam rigardata kiel pruvo de moderna ĝuokoncepto. Mi, veninta el provinca urbo České Budějovice, rigardis la faman poeton, kiu nubmiene sorbis sian absinton, kun tima respekto.

La kunvenoj de esperantistaj amikoj estis agrablaj – mi rememoras ilin kun dolĉa nostalgio. Eĉ ian virinan mienon mi malforĝegas, sed trajtoj ŝiaj estas jam komplete paliĝintaj. Min bedaŭru, ŝin ne! Sed organize la Klubo ne vivis, aŭ preskaŭ ne vivis. Venadis inter nin novaj interesatoj pri Esperanto. Ni abonis la gazetojn „Lingvo Internacia“, „Revuo Internacia“ kaj „Bohema Esperantisto“, legis ilin, ĉiu laŭ sia scio de la lingvo, sed organize la kluba vivo stagnis.

La prezidanto Weinfurter estis tre vigla kaj sukcesa komercisto. Li eldonadis ĉeĥlingvan monatan revuon *Epocha* (Epoko), turnitan al studentoj de duagrada lernejoj, en kiu aperadis artikoloj pri progresoj de la moderna tekniko. Ĉe li aperis grava ĉeĥa-germana vortaro terminologia por maŝinfako, la unua provo de lingva normigo en tiu ĉi fako. Li estis fidinda amiko, sed por Esperanto li estis iom seka. Por tia batalo ankaŭ entuziasmo estas necesa.

Aperadis kaj malaperadis novaj vizaĝoj de homoj altirataj pro noveco de la afero, ekzemple: D-ro Bičíšř, juna advokato-kandidato, leganta atente nian literaturon; Stanislav Balík, kiu post abiturienta ekzameno unu jaron promenadis tra Prago atendante postenon, poste li veturis – instigite el Esperanta korespondado – Francujon [Lyon-on], vivis tie unu jaron ĉe diversaj samideanoj, revenis kiel entuziasma admiranto de la franca nacio, ellerninte la francan lingvon tiel bone, ke li ornamadis sian konversacion per multaj „alors!“ . Li fariĝis oficisto en impostoficejo; J. Görner, simpatia oficisto, iom pedanta, sed dum jaroj fidela funkciulo de la Klubo; Josef Barvíř, jurista studento, junulo daŭre entuziasma kaj daŭre laborema; J. Herold, de post 1903 zorgema kaj fidela bibliotekisto de la Klubo. Ni povis prezenti al la venantaj interesatoj bonan literaturon.

*Fragmento de la libro Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*



Varsovia Vento Elsendoj

Aŭskultu elsendojn de  
**Varsovia Vento**  
<https://www.podkasto.net/>

# Lokoj ligitaj kun la frua historio de nia klubo

Tomáš Břicháček

La 12-an de novembro 2022 dum la jubilea festo mi gvidis edukon promenen tra la centro de Prago, kiu estis dediĉita al la historio de nia klubo. Sube vi trovos notojn pri la plej gravaj lokoj, kiujn ni vizitis. Kontraste al la promeno, ĉi tie la lokoj estas ordigitaj ĥronologie.

## 1. Iama gastejo U Pštrossů

adreso: Pštrossova (eksa n-ro 196), proks. nunaj domoj 199/25 kaj 218/27, Nové Město (Nova Urbo)

GPS: 50.0793153N, 14.4155575E

- ĝi estis en duetaĝa domo (inkluzive teretaĝon)
- en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento ĝi estis detruiita kaj anstataŭigita per modernaj altaj ludomoj (n-roj 199/25 kaj 218/27)
- la gastejo estis ŝatata kunveno de laboristoj / sidejo de *Politický klub dělnický v Čechách* (Politika Laborista Klubo en Bohemio)
- loko, kie en Prago Esperanto estis unuafoje propagata kaj instruata – de F. V. Lorenc, kiu iam en la komenco de la 90-aj jaroj de la antaŭpasinta jarcento prelegis pri la lingvo kaj poste gvidis kurson ĉi tie
- Stanislav Kamarýt skribas, ke la gastejo kaj sia „malgranda, longforma kaj fulgumita ĉambro gasteja ... estis la loko kaj okazejo de la Esperanta pratempo en nia lando” kaj aldonas, ke „eĉ se la tiea aktivado ne donis rimarkindan rikolton, apartenas al ĝi honora loko en la historio de la ĉeĥa kaj ĉeĥoslovaka Esperanto-movado.“



## 2. Restoracio Konvikt

adreso: Bartolomějská 291/11, Staré Město (Malnova Urbo)

GPS: 50.0830722N, 14.4175581E

- en tiu ĉi fama, ĝis nun ekzistanta restoracio okazis la 20-an de junio 1902 la prepara kunveno por la fondo de la praga klubo
- partoprenis proksimume 10 personoj
- oni akceptis statuton kaj decidis sendi ĝin al la landa oficejo por aprobo
- la fandan kunvenon oni decidis kunvoki nur en aŭtuno, post la oficiala aprobo de la statuto
- pluaj detaloj pri la kunveno troveblas en la rememoroj de František Barth supre (p. 11)

## 3. Iama restoracio U Štajgrů

adreso: Vodičkova 699/30, Nové Město (Nova Urbo)

GPS: 50.0809094N, 14.4246419E



- tie la 9-an de novembro 1902 la klubo estis fondita
- restoracio „U Štajgrů“ troviĝis en duetaĝa (inkluzive teretaĝon) konstruaĵo en la loko, kie hodiaŭ staras la granda secesia domo „U Nováků“
- partoprenis 15 homoj
- oni elektis komitaton – la unua prezidanto fariĝis Eduard Weinfurter
- pluaj detaloj pri la kunveno troveblas en la rememoroj de František Barth kaj Stanislav Kamarýt supre (paĝoj 11–12)

## 4. Kafejo Union

adreso: Národní 342/29, Staré Město (Malnova Urbo)

GPS: 50.0824717N, 14.4188036E

- la unua sidejo (kunvenejo) de nia klubo – ekde ĝia fondo ĝis junio 1903
- ankaŭ poste okazis tie diversaj klubaj agadoj (ekzemple ĝenerala kunveno en februaro 1918)
- la kafejo troviĝis en la iama „Domo de Brauner“ en la angulo de la stratoj Národní kaj Na Perštýně, kie hodiaŭ staras la oficeja domo nomata „Albatros“
- ĝi estis la centro de la praga kultura vivo en la 19-a jarcento kaj en la unua duono de la 20-jarcento

- pli da informoj pri la kafejo troveblas en la rakontado de Stanislav Kamarýt supre (paĝoj 12–13)

## 5. Kafejo Tůmovka

adreso: Lazarská 10/4, Nové Město (Nova Urbo)

GPS: 50.0790478N, 14.4200911E

- kafejo „Tůmovka“ aŭ „Tůmova kavárna“ estis la dua sidejo de la klubo (post la kafejo „Union“) – ekde junio 1903 ĝis (iam en) la jaro 1905  
- la eleganta ludomo, kie la kafejo troviĝis, ĉiam staras ĉi tie, sed la kafejo mem ne ekzistas jam jardekojn

✂ Stanislav Kamarýt: „[La] sidejo de la Klubo estis ŝanĝita. Ni transiris en la kafejon Tůmovka en la strato Lazarská. Ankaŭ ĝi estis kafejo de literaturistoj, sed sen fetiĉisma adorado de revuoj. La Klubo komencis kunveni regule ĉiusemajne en aparta ĉambro, malantaŭ la restoracio. La kunvenoj komenciĝadis post la 20-a horo, daŭris longe. Ni sidis ĉe unu laktokafo ĝis la 23-a, poste transiris la restintaj membroj en la restoracian salonon kaj konsumis la duan kafon. La prezidanto [Vojtěch Kraus], kvankam preskaŭ dudek jarojn pli aĝa ol mi, ŝatis ĉeeston de junuloj. La vizitoj de la kunvenoj fariĝis tre kontentigaj kun 20 – 30 partoprenantoj ĉiusemajne, iam eĉ pli. Venadis novaj homoj. Ni klopodis ĉe diversaj okazoj venigi homojn el diversaj elstaraj postenoj. Plurfoje ni sukcesis, sed iliaj vizitoj ne estis ripetataj. Komika rememoro mia estas pri vizito de d-ro Jiří Guth, la fama aŭtoro de trivoluma "Katekismo pri deca konduto en la socio". Li venis tre frue kaj - akceptite de ni kun dankaj honorigoj parolaj kaj observinte la neluksan salonon - diris, ke li venos post unu horo. Li ne venis plu.“

*Kamarýt S.: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*

## 6. Muzeo de Náprstek

adreso: Betlémské náměstí 269/1, Staré Město (Malnova Urbo)

GPS: 50.0840425N, 14.4166072E

- ĉe la Muzeo de Náprstek funkciis en la epoko, pri kiu ni parolas, la Amerika Klubo de Damoj  
- laŭ iniciato de tiu klubo nia membro Eduard Kühnl havis en marto 1904 enkondukan prelegon pri Esperanto, kiun sekvis kurso gvidata de li  
- poste en decembro 1904 konstituiĝis ĉi tie ĉe la muzeo la Unua Virina Grupo Esperantista  
- prezidantino iĝis Božena Studničková, instruistino kaj verkistino – la unua ĉeĥino, kiu verkis originalajn poemojn en Esperanto / animo de la grupo estis Matylda Krausová



## 7. Restoracio U Donátů

adreso: Spálená 110/53, Nové Město (Nova Urbo)

GPS: 50.0818558N, 14.4192047E

- la tria sidejo de nia klubo – ekde la jaro 1905 ĝis oni ne scias kiam – poste la klubo ŝanĝis multegajn kunvenejojn kaj ne eblas jam sekvi ilin
- anstataŭ tiama historia trietaĝa domo troviĝas en la loko hodiaŭ moderna alta domo (kun librejo kaj malnovlibrejo malsupre)

✂ Stanislav Kamarýt: „En 1905 la Klubo transmigris el Tůmovka en la restoracion U Donátů en la strato Spálená. [...] La vizitoj de la kunvenoj estis daŭre tre kontentigaj. La restoracio estis fama pro bona kvalito de sia biero. La konsisto de la membraro iĝis pli diversa, kaj laŭ la aĝo, kaj laŭ la socia pozicio.“

*Kamarýt S.: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*

## 8. Kafejo Louvre

adreso: Národní 1987/22, Nové Město (Nova Urbo)

GPS: 50.0821003N, 14.4187250E

- loko de la fondo de la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista
- ofta kunveno de la praga klubo en 30-aj kaj 40-aj jaroj

✂ Jaroslav Mařík: „Dum la nazia okupacio kelkaj fidelaj membroj, precipe Šustr, kunvenadis vespere, dum la estinta kutima kunven-tago, en nia iama ‚hejmo‘, la kafejo Louvre (Národní tř.), inter la aliaj gastoj, nur por interŝanĝi novaĵojn ktp. Post tempo la kelnero avizis nin, ke pasintfoje serĉis nin tie la gestapo kaj enketis la kelneron pri esperantistoj. Tiu rediris, ke neniuj kunvenadas en ilia kafejo. (Mi memoras inteligentan junulon nekonatan, kiu komencis venadi inter nin, kun aserto interesiĝi pri Esp-o. – Mi rekonis lin post jardekoj, kiam okazis (dum la komunisma reĝimo) ia studenta protesta kunveno apud la Mácha-statuo. Ĉu hazardo, aŭ ne – ĝi ja estis sub Petřín? Li aspektis kvazaŭ ruino...).“

*Mařík, J: 90 jaroj de Esperantista klubo en Praha (fina parto), Bulteno de Esperantista Klubo en Prago kaj de Esperantista Klubo en Brno, n-ro 2/1993.*

## 9. Žofín

adreso: Slovanský ostrov 226, Nové Město (Nova Urbo)

GPS: 50.0789711N, 14.4128133E

- en somero 1921 okazis ĉi tie la 13-a Universala Kongreso de Esperanto
- kun 2561 partoprenantoj el 35 landoj
- la palaco Žofín estis konstruita en 80-aj jaroj de la 19-a jarcento
- la kongreson alparolis interalie la ministro pri edukado Josef Šusta, ĉeestis Klara Zamenhof, vidvino de dr-o Zamenhof

- prezidanto Masaryk respondis al salut-telegramo de UK en Prago telegrafe: „*Capri la 4-an de aŭgusto 1921. Mi dankas pro salutoj al enlandaj kaj eksterlandaj kongresanoj. Mi deziras al via celado, servanta al progresema idealo sukceson. T. G. Masaryk.*“

- Edvard Beneš, ministro pri eksterlandaj aferoj en la salutletero al la UK skribis: „*La ideo de unu interkompreniga lingvo, kia estas Esperanto, estas grandvalora por ĉiuj sinceraj pacifistoj. Hodiaŭ ĝi ne plu estas utopio, sed problemo, pri kiu laboras intelektularo de la tuta mondo.*“

## 10. Domo de Ŝustr

adreso: Dlouhá 614/10, Staré Město (Malnova Urbo)

GPS: 50.0891356N, 14.4223250E

- ĉi tie loĝis Jaroslav Ŝustr – elstara esperantisto, multjara prezidanto de nia klubo (1931–1958) kaj ĝia honora prezidanto, honora membro de ĈEA, delegito kaj ĉefdelegito de UEA

- granda amo de Ŝustr estis la kluba biblioteko, kiun li daŭre ampleksigis. Li senlace havigadis al la klubo eksterlandan literaturon kaj gazetojn. Antaŭ la milito la biblioteko jam havis proksimume 1800 volumojn. Iom post iom ĝi kreskis. En la jaro 1969, kiam Ŝustr aldonis siajn proprajn librojn, ĝi jam konsistis el proksimume 4700 volumoj.

- detaloj pri Ŝustr trovebla en Bulteno n-ro 2/2019

## 11. Vendejo de Ŝustr

adreso: Benediktská (verŝajne 722/11), Staré Město (Malnova Urbo)

GPS: 50.0902153N, 14.4272233E

- iam en la tridekaj jaroj Ŝustr malfermis en la praga Dlouhá třída (Longa avenuo) vendejon de bongustaĵoj

- poste, eble jam dum la okupacio tiu vendejo translokiĝis al la najbara Benediktská strato, kie Ŝustr lasis desegni sur fasado (de la domo n-ro 9) grandan reklamon – ĝi rimarkinde restis tie ĝis nunaj tempoj

- la revuo Esperantista skribis poste pri la butiko, ke ĝi „*estis dum longa vico de jaroj kvazaŭ centra kunvenejo de esperantistoj el la ĉefurbo, el la provinco kaj el la fremdlando. Ĉiu veninto ricevis afablan informon; ofte ĝi signifis kuraĝigon; iam eĉ helpon materian al vojaĝanta samideano en embaraso. Ankaŭ tie, ne sole en la klubejo kaj en kluba administro, helpadis al li lia edzino, kiun ĉiuj esperantistoj konas kaj alte estimas.*“

Por promeno vi povas elekti ekzemple ĉi tiun sinsekvon de la stacioj: 3 – 5 – 1 – 9 – 7 – 8 – 4 – 2 – 6 – 10 – 11

## **Homoj...**

Eli Urbanová

Estas la urbo kiel maro  
kaj homoj sur la trotuaro  
kiel marondoj...

Homoj sennombraj... Kelkaj belaj!  
Homoj kun siaj bagatelaj  
zorgoj kaj ĝojoj...

Homoj diversaj, ofte strangaj,  
sed en sufero grandaj, grandaj,  
oni kliniĝus...

Homoj, do ankaŭ vi sur strato,  
al kiuj ligas min kompato,  
ĉefe kompato...

Homoj, vi tute fremdaj al mi,  
kiujn mi fine lernis ami  
per milda amo...

Iu akceptas, iu donas.  
Homoj, al kiuj mi pardonas,  
mem neperfekta!

Homoj kun siaj homproblemoj  
Homoj, ilia toleremo  
antaŭ tutĉio...

Homoj, vi sub la semaforo.  
Ni ĉiuj. Nia kunlaboro.  
Nia estonto.

Nia komuna viv' en paco...  
Homoj celantaj al la placo.  
Ek, jen la verda!

Estas la urbo kiel maro  
kaj homoj sur la trotuaro  
kiel marondoj...

*/Dua premio en Milano 1976/*

## Juna amo

Antonín Sova

Amato diris, kion povis li  
per la demand', kiu en vido bolis.  
Li diris ja eĉ multe, multe pli...  
pli ol ŝi volis...

La amon plii povas al pasi'  
nenio krom' la suk' de l' flor' papava.  
Ĝardeno ardas. Trinkis li kaj ŝi.  
okul' nokthava...

Ĉevalo blanka per averta hen'  
forrajdon urĝis sur la bord' de l' lago...  
Sed vane ja: Jam ambaŭ dormis jen  
en ĉirkaŭbrako...

Ĉevalo vadis en bluakva ban',  
la herb' susuris sub la ventotiklo,  
kaj muĝis ond' en arboakompan'  
tra nokta nigro...

Surbordis la ĉeval; dum sia vag'  
ĝi huf-al-ŝtone vekis ferotintojn...  
Per ros' matena spiris la ektag'  
sur geamintojn...

Kun flirta har' kaj laca la knabin'  
kolharon kaptis kun sel-salt' kuraĝa.  
per forta brako li alpremis ŝin. . .  
Ĝojkri' sovaĝa...

Kapturna rajdo, hej! Tra rokoj nun,  
tra pinopintoj, tra la nuboj, turoj  
de l' fuma urb', kaj kie brilas sun'  
sur herbveluroj...

Surtere tondris sonoriloj kaj  
la fagojn skuis vent', nubnaĝis aglo,  
kvazaŭ sunkreve brilis hela maj':  
printempmiraklo...

Nenio tondras pli ol juna sang',  
ol am' unua en kuraĝa drivo:  
nur ruĝa sang', nur blanka blank',  
nur viva vivo...  
1907

*Esperantigis Tomáš Pumpr*

A milenec řek' vše, co mohl říc'  
tou otázkou, jež z očí mlčky zřela.  
A řekl ještě více, mnohem víc.  
Ba víc než chtěla.

Co mohlo vašeň větší lásce dát,  
než odvar kvetoucích těch rudých máků?  
A napili se. Jak plá horký sad.  
Noc zívá v zraku.

U jezera kůň bílý náhle ržál  
svou výstrahu, neb čas byl dále jeti.  
Však jeden druhému již v loktech spal  
v osudném spjetí.

Kůň neklidně se koupal v modru vod  
za noci, jež tak šelestila travou,  
a hudbou lesů řeky doprovod  
táh' nocí tmavou.

Pak bloudil podél vod. A podkovou  
o balvan zvonil, aby vzbudil spící.  
Ubledlé ráno dýchlo rosou svou  
na milující.

...

## Okazintaĵoj ekde oktobro 2022

**13/10/2022** – prelego de Petr Chrdle pri Eli Urbanová (*klubejo*)

**09/11/2022** – aperis broŝuro *120 let esperanta v Praze* (kiel Bulteno n-ro 3/2022) kaj granda jubilea kroniko

**11–13/11/2022** – granda festo okaze de la 120-a datreveno de la Esperantista klubo en Prago

**24/11/2022** – diskuto kun Jiří Altior kaj Vladimír Liščák, reprezentantoj de la Instituto de renesanco de kultura heredaĵo (*klubejo*)

**08/12/2022** – Kristnaska vespero (*klubejo*)

**15/12/2022** – Zamenhoftago – tradicia kunveno ĉe Esperanto-monumento en Vyšehrad kun tosto, torto, kantado kaj amikeca babilado

---

## Hledají se některá čísla pražského Bultena

Rádi přetiskujeme pro naše čtenáře žádost Miroslava Malovce, která se objevila ve Startu č. 4/2022:

Při sbírání informací k dějinám pražského klubu esperantistů se ukázalo, že některá čísla Bultena nejsou ani v našem svitavském muzeu. Pokud někdo doma nebo v klubovně tato čísla máte, budeme vděčni aspoň za skeny, které prosím pošlete redaktorovi Starta, který má na starost i Paměť našeho hnutí.

Konkrétně chybí roky 1965–1968, poslední číslo 1969, první číslo 1973, poslední čísla roků 1974 a 1975, roky 1976–1985, číslo 2/1987, roky 1989–1990, čísla 3/1991 a 3/1992, rok 1993.

Děkujeme za pomoc.

Miroslav Malovec malovec@volny.cz

---

## Členské příspěvky 2023

Nezapomeňte, prosíme, zaplatit klubové členské příspěvky na rok 2023. Na základě rozhodnutí loňské členské schůze výše ročního příspěvku činí nově 200 Kč pro pracující a 100 Kč pro nepracující (senioři, studenti aj.). Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo bankovním převodem na bankovní účet č. 2801096435/2010. Při bankovním převodu uveďte raději svoje jméno. Případné dotazy směřujte na Jiřího Mišurce, [misuj@email.cz](mailto:misuj@email.cz).

# Rikolto de libronovaĵoj dum la jaro 2022

Petro Chrdle

En la jaro 2022 festis gravan datrevenon ne nur la Praga Esperanto-Klubo, sed ankaŭ la eldonejo KAVA-PECH, nome 30 jarojn de sia fondiĝo. Multajn el la legantoj certe ĉeestis la koncernan festenon en junio kaj krome prie rakontis ankaŭ la artikolo en la dua ĉi-jara numero de Bulteno.

Sed la eldonejo ne nur festis. Ĝi ankaŭ diligente laboris kaj mi ĉi tie listigu koncize la rikolton de ties laboro dum tiuj 12 lastaj monatoj:

- Chrdle, P.: *Ĉina, Korea, Japansko, země podobné, avšak rozdílné* – Priskribo de travivaĵoj kaj impresoj kolektitaj kun pluraj vojaĝoj al la tri landoj, kompletigitaj per multaj koloraj fotografiaĵoj de la aŭtoro faritaj dum liaj vojaĝoj (3 en Ĉinion, 7 en Koreion, 10 en Japanion).
- Chrdle, P.: *Ĉinio, Koreio, Japanio, landoj similaj sed diferencaj* – Esperanto-versio de la antaŭa libro.
- Kiselman C. O.: *Zamenhof's Yiddish Grammar and His Universal Language. Two Projects in Ashkenazi Culture* (Zamenhofa gramatiko de Jidiŝ kaj lia universala lingvo. Du projektoj el aŝkenazi kulturo). En la angla.
- Nezval, V.: *Manon Lescaut*, dramo en versoj laŭ la romano de Abbé Prévost en traduko de J. Kořínek kaj kun postparolo de V. Kočvara.
- Verne, J.: *Africká mise* – la lasta nefinita romano de J. Verne en traduko de J. Drahotová kaj kun ilustraĵoj de Miroslava Tomečková. Temas pri traduko el la Esperanta versio, tradukita de I. Ertl (kiu ankaŭ skribis la postparolon) el la franca originalo.
- Ráczkevy-Eötvös, Á.: *Atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj* – riĉe ilustrita priskribo de atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj.
- Ráczkevy-Eötvös, Á.: *Atributy apoŝtolů a evangelistů* – ĉeĥa versio de la antaŭa libro en la traduko de O. A. Fischer.
- Malovec, M.: *Velký česko-esperantský slovník / Granda Ĉeĥa-Esperanta Vortaro*. Ĝis nun la plej ampleksa eldonita ĉeĥa-esperanta vortaro. Kunlaboris Z. Pluhař, K. Votoček, J. Malá kaj R. Howard.
- F. Bolduc (red.): *Amo, tuso kaj forpaso – Homoj kaj kovimo*. Finalistaj noveloj de Interkultura Novelo-Konkurso.
- F. Bolduc (red.): *Láska, kašel a smrt – Lidé a covid*. La pli supra novelaro en la traduko de J. Košťálek kaj kun ilustraĵoj de M. Tomečková.
- Boltzmann L.: *Vojaĝo de la germana profesoro al Eldorado / Reise eines deutschen Professors ins Eldorado* en traduko de H. M. Maitzen – dua,

komplete dulingva eldono (la unua havis klarigajn notojn de la tradukinto kaj R. Fössmeier nur en Esperanto).

- Chrdle, P. (red.): *Honore al Eli Urbanová – 100 jaroj post la naskiĝo, 10 jaroj post la forpaso*. Ilustraĵoj de Pavel Rak. Enhavas la poemaron Peza vino kaj du mallongajn prozaĵojn de Eli Urbanová, priskribon de ŝia vivo kaj verko kaj enkondukon kaj personajn rememorojn de la redaktoro.
- Buttová, E.: *Roční doby a svátky očima zvířátek*. Bibliaj novtestamentaj rakontoj por infanoj kun ilustraĵoj de M. Tomečková. Momente ĝi estas tradukata esperanten fare de P. Petřík.
- Štanc, O.: *Bramborová kuchařka*. Mi envicigis ĝin ĉi tien, kvankam ĝi estas en la ĉeĥa, ĉar ĝin ilustris P. Rak, membro de la Praga Esperanto-Klubo.

Preskaŭ finpreparita por la preso estas la verko de Karl Bruckner *Sadako volas vivi* en la traduko de Jan Duda pri la knabino, kiu transvivis la atombomban atakon en Hiroŝimo. Bedaŭrinde jam tro longe mi atendas la promesitan licenckontrakton de la viena kopirajtposedanto, do mi ne povas promesi kiam, kaj ĉu entute, ĝi aperos.

---

## Informado pri Esperanto fare de P. Chrdle

Danke al du okazaĵoj, nome la tridekjariĝo de la eldonejo KAVA-PECH kaj apero de la libro pri la orientaziaj landoj, leviĝis intereso pri la intervjuoj kun Petro Chrdle, kiu ĉiam emfazis la rolon de Esperanto en siaj aktivecoj. Jen almenaŭ koncize:

*KAVA-PECH a Petr Chrdle*, en: Dobřichovické Kukátko en rubriko Personoj, 2022/3, p. 22-25

*Rozhovor s Petrem Chrdlem o ekoturistice, východní Asii a esperantu*. En: Tvůrčí život, 2022/3, Unitaria, Praha, p. 70–79.

*S esperantem do světa. Tak vzniknul i český knižní rekord*. En: KNIHKUPEC, novembro 2022, p. 66–67

*Čiňany, Korejce i Japonce jsem poznal díky esperantu*. En: Téma, 2023/??, Rosier, Praha – aperos baldaŭ

### Artikoloj en Esperanto pri la tridekjariĝo de KAVA-PECH:

Chrdle, P.: *Eldonejo KAVA-PECH tridekjara*. En: Revuo Esperanto, 2022/7–8, UEA, p. 154–155.

Rohloff, W.: 30-jara jubileo de la eldonejo KAVA-PECH, Esperanto Aktuell, GEA, 2022/4, p. 18.

## Ni esperantistoj devas fari ĉiu laŭ siaj ebloj

*Fina parto de la intervjuo de Irek Bobrzak kun Petr Chrdle en la 161-a elsendo de Varsovia Vento:*

*Petro, ia mesaĝo de vi por la esperantistoj en la mondo... Ĉu vi havas tion en koro? Kion vi ŝatus diri al homoj en la mondo, al la esperantistaro?*



Do mi estas maljunulo, do tio signifas, ke maljunuloj devus verŝi saĝecon. Sed mi ne tiel alte taksas min.

Mi havas de juneco mian propran sloganon, kiu sonas: *Kio estas alirebla, tio ne logas min. Per preterpaŝo ni kreskas.*

Mi ne scias, ĉu estas klare, kion mi volas diri. Sed tion mi volas mesaĝi al la esperantistoj. Ĉar multaj esperantistoj diras, ke Esperanto estas mortanta kaj ke ne plu valoras fari ion por ĝi, ktp.

Sed tio ne estas vero. Mi kredas, ke Esperanto havas sian estontecon. Sed tiu estonteco dependas de ni esperantistoj. Kaj ni ne atendu, ke iu registaro aŭ EU aŭ iu ordonos, ke oni lernu en lernejoj Esperanton. Ne, ne. Ni esperantistoj devas fari ĉiu laŭ siaj ebloj. Do mi estas eldonisto, do mi strebas krom la ĉeĥajn eldonadi ankaŭ Esperanto-librojn. Se iu estas kantisto kaj esperantisto, li kantu ankaŭ Esperante. Se iu estas desegnisto, faru ilustraĵojn en Esperanto-verkojn. Kaj tiamaniere ni komune zorgu, ke Esperanto vivu, vivu kaj floru.

---

## Termíny schůzek leden až červen 2023

5. 1. / 19. 1. // 2. 2. / 16. 2. // 2. 3. / 16. 3. / 30. 3. // 13. 4. / 27. 4. // 11. 5. / 25. 5. // 8. 6. / 22. 6.

### **Klub esperantistů v Praze,**

pobočný spolek Českého esperantského svazu, zs.

Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00  
Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>  
E-mail: [paha@esperanto.cz](mailto:paha@esperanto.cz)  
Facebook: <https://www.facebook.com/esperantoprago>  
YouTube: Esperanto Prago  
Schůzky: Ve Smečkách 25, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00